

Rudolf Baumbach,  
En la glaso ne guto plu

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1 Estas eĉ ne plu guto en  
mia glas', la monujo sen  
mono; estas la fino.  
Ebriigis ja la vin',  
kaj rigardo via min,  
ho gastejo-mastrino!

2 "Je kredit' ne povas mi  
doni vinon plu al vi,"  
diras ŝi ridante.  
„Povas por la garanti'  
vian sakon doni vi,  
restu plu trinkante!“

3 Interŝanĝas tiun ĉi  
sakon kontraŭ vino li,  
volas survojigi  
sin, sed diras la mastrin':  
„Lasu, juna ulo, vin  
garantiaĵigi!“

4 Donas por la garanti'  
ĉiujn siajn aĵojn li  
kontraŭ dolĉa vino;  
affiktite volis sin  
turni for de la mastrin',  
la belega ino.

...

5 Diras tiam tiu ĉi  
bela ino: „Donu vi  
koron al mi vian!“  
- Mi sciigas nun al vi,  
ke sur sia buŝo ŝi  
sentis jen alian.

6 Verkis tiun kanton ĉi  
en somera nokto mi,  
gaje ĝin kantanta.  
Sidis antaŭ glas' da vin  
mi sur benk' kun la mastrin'  
sub tilio floranta.

*Traduko de la Germana poemo “Keinen Tropfen im Becher mehr” de RUDOLF BAUMBACH (\*1840 – †1905) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2003-10.*

*MR-408-1a / Arg-68-133 (2003-11-21 15:58:39)*